

## 68a Kongreso de SAT-Amikaro en Metabjeo

### Protokolaro

kompilita laŭ notoj de Maksimiliano Gverino, Vito kaj Vinko Markovo, Guy Martin  
*Laste ĝisdatigita/polurita je la 20a de junio 2013*

### Prelego de Ueli Haenii pri digna morto. *Sabaton la 30an je la 14:00*

Enkonduko per triopa diskutigo de bildo kun Marino, Sarkozio kaj Bajruo demandante, ĉu ili intencas baldaŭ morti?

Se iu havas suferantan hundon, oni konsiderus kruela la posedanto se li ne perus morton por la hundo.

Dieter: ekzistas nur unu vojo.

Ueli: en Svisio, oni ne punas helpmortigantojn se la helpanto ne rekte profitas el la morto. Kontaktoj demandis al mi recepton por la veneno.

Lucia: oni povas resti konscia. Mi ŝatus resti konscia kiam mi morto.

Ueli: se ne aliaj estas ebriaj ĝis morto.

Maria Morizot: mi havas amikon kies edzo estas tre malsana, longe pagis por EXIT. Nun ne plu konscia, sed plu vivas. La spirito jam ne plu ekzistas. Nun ne plu konscias, dum ne povas uzi ĉi tiun eblecon.

Ueli: leĝo postulas, ke la persono estu kapabla je decido je la momento de la morto. Ne eblas peti la opinion de la persono.

Karlaĉo: ĉu ne eblas tion programi per testamento?

Serĝo: hundo ne donis sian opinion, tamen oni taksis kruele lasi lin plu vivi.

Ueli: kiel kuracisto devas konstati, ĉu iu kapablas pensi, rezoni ktp. Ankaŭ trarigardas la dokumentaron kune kun la malsanuloj.

Mirejo: la propono de Karlaĉo postulas ŝanĝon en la leĝo. Ĉiu lando havas apartajn leĝojn pri tio.

Karlaĉo: respondo al mia demando estas ne.

GiMo: en diversaj landoj estas diversaj kulturoj. En kelkaj oni tiel mortas nature. Male al la bestoj, homoj meritas kruelecon. Ĉu en aliaj landoj estas aliaj kutimoj?

Ueli: en Oregonio en Usono, ebleco ekzistas pere de du aŭ tri kuracistojn. En Zuriko necesas du diversaj renkontiĝoj kun la kuracisto, en Berno unu sufiĉas. En ĉiuj landoj, oni aŭdas pri persona akcidento ĉe la fervojo. Unu el la manieroj nekompareblaj kun la antaŭa bildo. Mortigo kun helpo ne estas agrabla.

Mirejo: oni devas konsideri la suferojn de la lokomotivo-stiristoj.

Dieter: forte malkonsentas, ĉar junuloj memmortiĝas pro depresio.

Mirejo: en Japanio kaj Svislando, la problemoj estas kapti la nombrojn. En Japanio 813, en Svislando 400. Proportio estas pli en Svisio. Kontraŭjapana propagando en Svisio. Se iu sentas sin nebone, ĉu estas alia vojo. Giganta problemoj kun kultura, religia kaj socia aspekto.

Aleks: en Vikipedio, aliaj statistikoj. Bjelorusio estas la ĉefa laŭ elcento de loĝantaro. Poste Litovio, Rusio, Japanio. Laŭ Monda Organizaĵo pri Sano.

Mirejo: kiun mi ne fidu.

Ueli: prezentas tekston. Kuracisto volis enkonduki leĝproponon por proponi liberecon por decidi. Gravega kondiĉo: akompani personojn juĝkapabloj.

Lucia: en ADMD estas du aŭ tri "fidindaj personoj". Kiu estas la rolo?

Ueli: iuj sekcioj de EXIT akceptas eksterlandanojn. Dum la diskuto pri balodado en Vaŭdo, risko pri banaligo de la memmortigo..

Mirejo: ankaŭ erare penso, ke oni pli sinmortigos parolante pli.

Vinko: kio pri la ekonomia premo al la libera decido?

Ueli: tabuo pri la morto de alia aŭ de mi mem;

Serĝo: ankaŭ ekzistas industrio de la pluvivigo de homoj.

Mirejo: plu legas. Ŝajnas al mi normale peti helpon pri sinmortigo.

Ueli: foje afero aperas ne pripensita. Sinjorino X plu ridi kun siaj najbarinoj.

Aserto pri tro facila memmortiga morto, ĉefe por iu kiu suferas, sed ne por io kio kondukos al morto de si mem. "Vere estas ke neniu estas laca de la vivo."

Lucia: ne ĉiu perceptas la aferon sammaniere. Ĉiu decida kiam ne plu eblas.

Ueli: proponas kolekti reagojn resumajn per metodo 33.

Sonia: kiam la bebo venas al la mondo, la vorto estas "la délivrance". La fino estas la sama vorto.

Serĝo: kiam vi donas vivon, vi ankaŭ donas morton.

XX: pensis ke la persono mem prenu la glason kaj trinku.

Ueli: plej facila estas ke la veneno estu en glaso kaj trinkiĝu rapide, ĉar jam dum trinkado vi ne povas trinki la tutan dozon. Ankaŭ eblas ricevi tubon tra la stomako, kaj ricevi dozon. Pri la okulfrapo kiel signalo, ne scias kiel oni efektivas. Kazo Wellby, italo kun flankaj sklerozoj. Granda diputo ĉar la malsanulo nur povis skribi komuniki, ke oni deprenas la elektron de la spiraparato. Diskuto ĉu puni la kuraciston.

Aleks: filmo pri la temo: "kelkaj printempaj horoj" kun Vincent Lindon kiu akompanas la patrinon al Svislando.

Lucia: tre malvarma morto.

xx: ankaŭ hispana filmo kun simila temo.

Karlaço: konkreta demando. Se mi volus iam profiti de tiu ebleco, kion mi faru? Ĉu telefoni al vi?

Ueli: jes kaj membriĝi en asocio por eksterlandanoj. 45 sf jaroj. Ankaŭ 900 sf por dumviva membreco.

Mirejo: dankas.

### **Prelego de Saladeno pri "Eo oficiala lingvo de Eŭropa unio, nun!"**

Saladeno (Thierry Saladin): ne estu oficiala, sed komuna lingvo.

Iniciato de 16jara junulo logxanta en Brazilo. Iom pli ol 4000 subskriboj el la tutmondo nun post 6 semajnoj, en cx unu monato.

Unua pasxo devus esti Euxropa cxar la movado ne estas suficxe forta.

Mirejo (Grosjean): Reprezentas UEA en Gxenevo. Kunzorgis pri agnoskigo de KER cxe Euxropa Unio. Mecenato Mijosxi' ankaux samstrategias pri unuaindeco de EU.

Lapeno siatempe ricevis respondon de UN, ke gxi rilatas nur kun registaroj. T.e. ekzistas reguloj, al kiuj endas submetigxi por povi eniri oficialajn kadrojn.

Pri agxo (16), rakontas pri sperto kiam sxi devis prezenti Eon antaux mosxtuloj post paso de tiama prezidento Francia. Sxi estis en Laskauxa groto, k menciis ke, kiel la knaboj trovintaj la groton, Z estis 14jara kiam ekkonstruis Eon.

Pri petskriboj, gravas ke homoj vidas la vorton Eo. Graveco de ripetaj agadoj. Homoj ne konvinkigxas cxe la unua kontaktigxo kun Eo.

UN estas Unuigxintaj Registaroj (ne Nacioj).

En Gxenevo ekzistas Homrajto-konsilia halo kie eblas malformalaj diskutoj inter popolanoj.

Tri celoj en Gxeneva laboro. 1: lingva situacio nekontentiga (listigas erarojn de interpretistoj). 2: homoj sciu kio estas Eo. 3: homoj parolu pri Eo sen antauxjugxojn, sen stereotipoj, sen emocioj. Celoj atingitaj kun la stabanoj de UN.

Ses UN-lingvoj estas angla, franca, hispana, araba, cxina, rusa.

2 vojoj: aux unu sxtato oficialigas Eon (ekz Hungario, iom avangarda pri Eo), aux sxangxi la regularon de EU, kiu diras ke gxi konsideras nur oficialajn lingvojn.

3a vojo: proponi legxon laux popola iniciato.

Aleks': malema al kritikado, sed, resume, ne cxiuj iniciatoj estas subtenindaj. Junuleco ne estas pravigo en si mem. Monto da laboro naskas muson. Vortigo de la petskribo ne komune elpensita, individua iniciato, tute ne kolektiva. Ankaux la gastiganta retejo (Avaaz), tute ne estas tauxga. Pli bone kunlabori por kunordigita agado kun konsidero al la pasintaj provoj, el kiuj indas lerni, por agi pli inteligente.

Sal: komprenas la dubojn. Konsideras la junecon de la ulo simbola, same kiel lian nekonatecon en la movado. Kion fari se ne tion?

Aleks': EDE, EEU, multaj jamaj problemoj.

Mir: tre subtenas ideon de kunlaboro. Ajnsxtajnoj estas kelkaj sed ne multaj. El kolektivo naskigxas efiko.

Sergxo Sir': Duflankeco de tiaj agadoj. Pri EDE propra sperto, ke loke homoj priridas lin pro la rezulteto.

Ueli: ne fidas Avaazon, do kiel subteni tian iniciaton?

Vito: Mencias la kunordigitajn agadojn zorge pripensitajn kiel kampanjo "Eo au bac". Mencias ankaux la arhxaikecon de la konsidero ke Eo estu unue enkondukenda en EU, dum nuntempe la E-movado tute ne estas plej motora en EU.

Tjeriko: multaj substribintoj estas ne EU-anoj, sed el cetero de la mondo.

Vito/Mir/Ser: plia kontraŭargumento, kiu senvalorigas la finan rezulton de la petskribo, signifas ke eĉ pli multe da EU-anoj ne subtenas la aferon.

Vito: Kion vi esperas daŭrigante la petskribon ĝis 2020 minimume ?

Sal: teĥniko de la turneado. Pretas rondiri Francion por prezenti la iniciaton, k proponas sekve organizi publikajn prezentojn de la lingvaj problemoj en EU.

**Unua laborkunsido**  
*dimanĉon la 31an de marto, 9a30*

GiKo: [teksto aldonebla] danke al Mirejo kaj Serĝo ni kongresas en Metabjeo. Kvartaga kongreso kun riĉa programero. La vorto "limo" enkondukas la ĝeneralan temon de la kongreso. Antaŭ SAT-Amikaro atingas kelkajn limojn. Malkreskiĝo de la membronombro kaj nombro de komitatanoj, kaj misfunkciado de kelkaj aferoj. Prepariĝi, adaptiĝi al la ŝanĝoj, jen nia laboro. Dankas al S-ro Despré, kiu hieraŭ akceptis delegacion en la urbodomo, kaj ankaŭ estas prizorganto de tiu ĉi centro.

S-ro Despré: estos mallonga kiel junulina robo. Altiri la atenton, kaj kovri la ĉefan aferon. Bonvenon en Metabjeo, kiel direktoro de la Komunumo de Azureva kaj urbestro. Se julo varma, pasko malvarma. Dankon al vi pro elekto de Metabjeo. Mallonge aperis dum la kongreso. Komprenis ke vi havis problemon kun bonvoluloj kaj asocioj. Same estas ĉie, estu trankvilaj. La filozofio de via movado ŝajnas al mi tre interesa kaj kongrua kun la nunaj bezonoj. Balotoj venontjare, do...

Mirejo: Mi salutas vin nome de SES. Asocio kun du prezidantoj (germanlingva kaj franclingva).

Roland Cuenot: Nome de la Esperanto-muzeo en Gray, mi salutas la kongreson. Kaj mi salutas vin nome de Franĉkonteo.

Dieter Rooke: Nome de kultura centro de la Chaux-de-Fonds.

Jorgos: Nome de Pireneoj, Ariège. Ni preparas eventon.

Françoise Guilhaumé: Mi salutas vin nome de la komitato de Grezijono.

Guy Cavalier: Mi salutas vin nome de Radio Eo.

Franjo: Je la nomo de SAT, Plouezec, kaj Interkant', mi salutas vin.

Aleks Kadar: Speciala dediĉo por Serĝo nome de EDE. Mi ankaŭ salutas vin nome de Francilia Federacio.

Lucette Echappé: Vi povas veni al Kvinpetalo apud Poitiers.

Anne-Marie Ferrier: Komitato de Burgonio. Mi organizas eventon ĉiu-jare. Mi ne volas, ke esperantistoj restu nur inter si. Mi volas, ke aliuloj interesiĝu pri la movado.

Vito: Mi volas saluti nome de Verda Stelo (asocio de departemento 94), kaj nome de SAT-EFK. Mi alvokas la ne SAT-Amikaranoj partopreni, eĉ en la franca.

Guy Cavalier: Nomo de Phil, kiu ne povas partopreni.

*Roland Cuenot estas elektita kiel prezidanto por la unua laborkunsido. Franjo Lévêque por la dua.*

Roland legas la raporton (el la SAGO n°93 - p.4).  
...nekotizuloj, el kiuj mi estas - huu! - ...  
...idla - iom teĥnika termino, kiun mi ne uzus tie...

Rolando: pri tiu agadraporto, ĉu demandoj.

GiMo: volas aldoni alian tekston ĉe la paĝo 3. "Gravaj krizo" en SAT-Amikaro. [legas la tekston]

Rolando: do iom pli grizigis la situacion.

Aleks: ne havas demandon sed kompletigon pri la agadraporto 2012. Pri la petskribo, iom kontraŭdiro ĉar en la unua kolumno "fino de la kampanjo", kaj en la dua ke estas nefinzorgado. Kampanjo ne estas finita. La kolektado de subskriboj finiĝis en oktobro 2012, sed nun restas la desupra parto. Unu estas sendado de leteroj al ĉiuj parlamentanoj por anonci la rezultojn de la kampanjo. Letero jam skribita de Fredo Scibor kaj Guy Camy kaj baldaŭ disdonota al parlamentanoj. En la plano estas organizi gazetaran konferencon en Parizo. Tria parto estas deponi la subskribojn ĉe la ministerio pri edukado. Tiam oni diros ke la kampanjo estas finita.

Vito: ege dankas Alekson por la kompletigo. Instigas ĉiujn ĉeestantoj aldoni ion en la agadraporto. Skribis la raporton, sed ne ĉion listigis. Instigas al diversaj raporto.

Vinko: demando pri perkoresponda kurso. Ĉu Marc Noel estis kontaktita en Ĉatoruso?

Serĝo: tute ne. Entute estas malmultaj petoj. Ŝajnas al mi ke la formulo ne estas tre utila.

Rolando: ĉu ne plu adekvata formulo ?

Serĝo: ĝis nun kvin lecionoj. Malmulte da laboro por malgrandaj rezultoj. Eĉ tute fuŝa letero de alĝeriano.

Jorgos: en Francio oni povas facile rilatigi la homoj al lokaj organizantoj.

Serĝo: ne estas abundo da homoj pretaj por korekti.

Lucette: se oni ne prezentas pli entuziasme la aferon, eble tio malkuraĝigas la lernantojn.

Veroniko: salutas nome de JF Blin, kiu proponis sin por labori kun la novuloj.

Maksimiliano: informoj pri taskoj de la komitato kaj problemoj en dispartigo de la taskoj. Situacio estis prezentita iom grize, sed iuj taskoj povas esti faritaj de simplaj membroj. Multaj asociaj taskoj povas esti faritaj rete aŭ telefone. Se vi estas interesata pri unu el tiuj taskoj, oni povas diskuti kaj dispartigi. Ekzemple Veroniko okupiĝas pri multaj taskoj kaj timas pri eksplodo. Tre grave estas dispartigi la taskojn.

Anne-Marie Ferrier: por helpi Veronikon en la libroservo, necesas loĝi en Francilio. Interesiĝas sed loĝas malproksime.

Maksimiliano: vi povas diskuti kun Veroniko pri la libroservo.

Veronique Bichon: kie troviĝas tiu taskolisto ? Amikino mia kaj mi pretus helpi, sed ne en Pariza regiono.

Maksimiliano: ĝis nun ĝi estas ĉefe labordokumentoj interne al la komitato.

Anne-Marie: ni povus skribi por partopreni al la komitato se ni scius pri la taskoj.

GiMo: eble Filipino povus paroli pri la agado de la dinananoj pri la librosendo.

Filipo Stride: la dinana grupo interŝanĝas kun afrikanoj por helpi ilin per libroj, ankaŭ por instruado. En kongolando iu kreis grupon "Sud-Kivu-SAT-Amikaro", celo ne estas la sama.

Giko: oni devas fini tiun jaran raporton.

Vinko: pri FEI, neceso lerni kaj havi malferman spiriton kaj ne cedi al paniko. Novaj eblecoj pri faka ekzameno rilate al sciencoj kaj teĥnikoj. Diferencoj kun KER, pri movada kulturo. Du kandidatoj nun trapasas la ekzamenon. Aldonas saluton de Marcelo Redulez kaj Claudine Pomirol.

*Aplaŭdoj.*

Jorgos: ege ŝatis la intervenon de Vinko, ke UEA ne estas diablo. Eble ne ĉiuj konscias, ke la angla estas duoble pli parolanta ol la angla. Baldaŭ tre parolata en Afriko. Ĉu komitato tie?

Vinko: pri la kongreso en Benino. Ĉu aliaj eblecoj antaŭviditaj?

GiKo: por tiu afero, ni opiniis ke ni devas plifortigi la movadon en Afriko. Necesus ke estu grupo kiu invitos nin. Nun tio ne estas reala afero. Tion devas fari loka grupo. Fine de la jaro estos kongreso en Kotonuo.

Franjo: vi parolis pri skipo kiu unue zorgu pri la organizado de kongreso. Ĉu ni havas ĉiujn kondiĉojn en Francio. Eĉ en Francio, la kongreso ripozas sur la ŝultroj de unu aŭ du.

Robin' Beto: pri organizado de SAT-Amikara kongreso en Afriko, el diversaj vidpunktoj. Porinformo mi kaj aliaj kamaradoj el suda francio planas organizi grupetan vojaĝon al Togolando. En Togolando Adje Adjevi vigle laboras. En kontakto kun grupoj sufiĉe SAT-Amikarecaj. Eble tiu vojaĝo komence de januaro 2014 povus esti prepara paŝo. Mi povas tute imagi kunporti materialon en 2014. Se ni timetas partopreneton en Afriko, ĉu ni celas resti inter franclingvi-eŭropanoj. Foje necesas lasi aferojn por akiri novajn. Eble lasi iom da sekureco.

## *Aplaŭdoj*

Lucette: se oni volas ŝpari kerozenon el ambaŭ flankoj de la maro, ĉu ne eblus uzi modernajn ilojn? Ĉu ni povas imagi, ke kelkaj iros kaj sekvos la renkontiĝon.

Vinko: kompletigo pri ekzisto de 5 SAT-anoj en Togolando kaj pri ASELT (Asocio Sennacieca de Esperantaj Laboristoj en Togolando). Ebleco presi PIV-on en Afriko por afrikanoj nun pristudata.

Robin': du pliaj elementoj, pri skajpo eblo fari multon. Kampanoj esperantistoj ekzistas tra la mondo. Ni kiuj povas tien iri eble ŝuldas tion al ili.

Rolando: voĉdono de la agadraporto, kaj poste iro al la kontado. Kotizpagintoj por 2012 estas rajtigataj por voĉdoni.

*Neniu kontraŭas. Unu sindeteno. 29 por.*

Rolando: listo de kandidatoj por la komitato en 2014.

GiKo: momente en la komitato estas Phil Guichet neĉeestanta, Giko, Gimo, Veroniko, Maksimiliano kandidatas.

Maksimiliano: vi povas esti komitatano sen loĝi en Francilio.

Aleks: kiuj kondiĉoj?

Maksimiliano: devas esti membro de SAT-Amikaro kaj membro de SAT de du jaroj.

GiMo: nur kvarono de la membroj de SAT-Amikaro rajtas kandidatiĝi. Tamen strangaĵo en iu asocio. Laŭ mi gravas ke la membroj de la kandidato estas grave, sed ke de du jaroj, estas eta problemo. Pri 2014, ŝatus esti kandidato kondiĉe ke tiu komitato estu iom renovigita.

Maksimiliano: laŭstatute, ni devas esti minimume ses membroj en la komitato. Ni havis ĝeneralan sekretarion kiu estas Vito, nun ne plu. Librotenanto estas Veroniko. Kelkaj taskoj ne aperas en la statuto, kiel respondeculo pri lokaj grupoj. Ni parolos pri la statutoj dum la laborgrupo. Ni devas havi kandidatojn por la komitato.

Franjo: ĉu tiu statuta punkto kiu necesigas ani en SAT de du jaroj nepras?

Serĝo: ŝajnas al mi, ke ne tie kuŝas la problemo.

Franjo: pri mia propra sperto en SAT, aniĝis kelkajn monatojn antaŭ la kongreso en Kazanlak, serĉis ĉiujn por helpi. Estis granda diskuto, kvankam devus esti nepre aniĝi pri SAT.

Ansofi: pruvo ke ne okazis ŝanĝi la statuton pri tio. Kial la statuto estas iom severa pri tio ? Tutsimple ĉar SAT-Amikaro havas kiel celon arigi la homojn al SAT. Normale ke oni postulu de la respondeculoj esti en ambaŭ asocioj. Membreco de pluraj jaroj estas garantio pri la kapablecoj de la homoj plenumi la respondecojn. La funda kialo de la nuna statuto restas.

Veroniko Bichon: responde al Ansofi, por mi kiu estas membro de SAT-Amikaro kaj ankoraŭ ne de SAT, pro tio ke mi ĝis nun ne konsciis pri graveco esti membro de SAT. Tamen se eblus eniri la komitaton, tio estus favora situacio por aliĝi al SAT;

Isabelle Lamy-Rested: kial du asocioj? SAT kaj SAT-Amikaro.

Serĝo: do kial patrino kaj filino.

Rolando: SAT estas Sennacieca kaj Tutmonda, SAT-amikaro interesiĝas pri franclingvio.

Filipo Stride: bonvolas kandidatiĝi por daŭrigi la laboron pri la statuto.

Veroniko: ankaŭ ebleco aliĝi.

Vinko: membriĝo de Franjo, voĉdonado pri ekcepta akcepto. diferencoj SAT kaj SAT-Amikaro.

Vito: tre ĝojas ke mi eliris el la komitato, ĉar tiel homoj eniras. Samtempe kiel Franjo la dua eksterstatute akceptita kandidato estis Etel Zavadlav, kiu devis esti eksigita el la asocio kelkajn monatojn pli poste.

Robin': por kompletigi la bildon de Vinko pri diferencoj SAT kaj SAT-Amikaro. En SAT ekzistas Poresperanta fako por la regionoj, kie ne ekzistas LEA-oj.

Ansofi: kompletigi pri diferencoj, ankaŭ la membroj ne estas samaj, ĉar SAT agadas mondscale, kaj SAT-Amikaro franclingv-scale. Kvankam estas aliaj homoj, iuj membroj de SAT ne povas esti membroj de SAT-Amikaro. SAT uzas nur esperanton por sia laboro.

Jorgos: oni povus aldoni la vorton "prefere".

Ansofi: por respondi al via demando, sen ŝanĝi la statuton, oni devas membri en ambaŭ asocioj, ĉar la celo de SAT-Amikaro estas duobla: varbi por esperanto, kaj varbi por SAT. Komitatano kiu ne estus membro de SAT ne estus taŭga por fari la laboron konkrete. Se en malfacila situacio kiel la nuna oni

Aleks: pri la konfuzo, la nuna SAGo estas tute en Esperanto krom unu paĝo.

Serĝo: la revuo ne estas propagandilo, sed ligilo inter la membroj. La anoj esprimiĝas laŭplaĉe. Se vi bezonas propagandilon, tute ne estas tio. Revuo de la anoj.

Gimo: bonvolu veni je la 18a, pri la SAGO.

Rolando: kiu kandidatiĝas?

GiKo: Phil ne kandidatas.

Robin': la respondo de Veroniko Bichon estas interesa. Ĉu oni unu decida pri ebleco akcepti eksterstatute kandidatojn ?

Rolando: legas franclingve la statuton.

Vero Girard: relegas en esperanto: membroj de SAT-Amikaro kiu minimume de du sinsekvaj jaroj membras en SAT.

Jannick: de kiam?



GiMo: 1945.

Vero Girard: fakte ne gravas, du jaroj pasas rapide.

Gimo: do la propono estas, ke ni kongresanoj konsentas por ke kandidatoj ne laŭregulaj kandidatiĝu por 2014, Anne-Marie Ferrier kaj eble Veroniko Bichon.

Ansofi: ĉu la kandidatoj fariĝu membroj de SAT ? La escepto koncernu nun la nunon. Se la homoj povas pagi la du jarojn kial ne, se ne kiel taksu la rilaton al SAT. Kongreso ne decida pri escepto.

Giko: proponas ke la komitato diskutu tion ĝis morgaŭ. Por Filipino ne estas problemo ĉar estas SAT-Ano. Kun Anne-Marie ni diskutos rekte kaj donos la rezulton al ili.

Maksimiliano: ni ne povas nun modifi la statuto.

Robin': instigas la komitaton diskuti ne nur kun Anne-Marie, kaj ankaŭ kun Veroniko Bichon.

Anne-Marie: se mi ne aliĝas al ambaŭ asocioj, estas pro mona problemo. Mi ne povas pagi la duan aliĝon.

Vero Bichon: mi pretas helpi la komitaton laŭ miaj eblecoj, sed ne formale kandidatiĝi.

Maksimiliano: preferas tion.

Rolando: prokrastas la temon por diskuti kun Anne-Marie. Ni ĉesu ĉar nin atendas la fotiston. Dankas pro la partopreno en la kunveno. Poste restos traktendaj la kontoj kaj aliaj aferoj. Morgaŭ je la naŭa precize.

Veroniko Girard: eblas aĉeti "Ĉe la lago" ĉe la libroservo.

**Laborgrupa pri Statuto**  
**sabato la 31an de marto je la 14:00**  
*Gvidita de Philippe Stride*  
*Protokolis Maximilien Guérin*

Kio estas niaj celoj ? Kio estas specifeco de SAT-Amikaro en la esperanta movado ?

Propono : verki minimuman statuton kaj regularon.

Pluraj vortoj uzataj en la statuto povas esti problemaj ĉar miskomprenitaj :

travailleur / laboristo

milieu d'avant-garde / avangarda medioj

lutte des classes / klasbatalo

propagande / propagando

Kaj aliaj kiel gauche / maldekstro ; progressiste / progresema

A1 - Nomo de la asocio

Proponoj :

- konservi : SAT-Amikaro - Union des travailleurs espérantistes des pays de langue française
- SAT-Amikaro - Union des travailleurs espérantistes de langue française

- Espéranto Solidarité
- Anstataŭi « travailleur » per « progressiste »
- Anstataŭi « travailleur » per « de gauche »

#### A1 - Medioj

##### Proponoj :

- konservi : Milieux d'avant-garde
- les milieux définis par l'article 1 des statuts de SAT

#### A3 - Membroj

- konservi : lutte des classes
- lutte sociale
- forigi tiun parton

#### A4 - Komitato

5-10 anoj, nepre prezidanto k kasisto

forigi problemon pri 2-jara aliĝo por meti ĝin en regularo

#### A8 - Propagande

- konservi : propagande
- communication

### **Laborgrupo: Kiel diskonigi SAT-Amikaron** *dimanĉon la 31an de marto je la 15:30*

Ne multaj novaĵoj pri varbado.

Ne detale listigi ĉiujn proponojn.

Mi publikigos liston de precizaj kaj konkretaj varbadrimedoj per la Sago kaj la dissendolisto.

Interesuloj povos plenumi ilin laŭdezire kaj informi la komitaton kaj la membraro (per artikolo en la Sago).

Deciditaj :

S. Sire okupiĝas pri eldono de poŝtmarkoj/poŝkarto

Mi kreas duan dissendoliston pri SAT-Amikaraj informoj

### **Laborgrupo: Disvolviĝo de SAT-Am en Afriko** *dimanĉon la 31an de marto je la 15:30*

Gvidis Mirejo. Protokolnotoj trovendaj...

### **Laborgrupo pri la SAGO** *dimanĉon la 31an de marto je la 18:00*

*Eko per lego de enkonduko en la kongresgazeto.*

Serĝo: la SAGO estas ilo, ne havas apartan rolon.

GiMo: rolo de la komitato. Kia ĝi estu tiurilate?

Serĝo: devas enteni la oficialajn komitatajn komunikojn. Referenc-punktoj.

Vito: komitato ja havu superrigardo al la enhavo, eĉ por enmeto de administraj informoj.

Serĝo: situacio ne komplete nigra. Nur malhelgriza. Tutcerte ni devos malpligrandigi ion. Ĉu la paĝonombro, ĉu la ritmon, ĉu la kvaliton.

Ansofi: kiam vi prezentas la aferon tiamaniere, tial pli klare necesas diri, kion oni deziras. Mi mem ne faris multon. Se tio estas la problemo, mi ne deziras ke ĝi estu nur ligilo inter ni. Plu uzas la SAGO-n kiel propagandilon. Estu la oficialaj informoj sed ankaŭ verkoj de membroj kiuj informas pri informoj en diversaj lokoj. Ankaŭ bezonataj kulturaj tekstoj originalaj, kaj ankaŭ pli longaj artikoloj debat-portaj. Ankaŭ eble pli da artikoloj pri la okazaĵoj en SAT. Allogi al SAT. Baldaŭ sendos artikolojn kolektitajn de lernantoj.

Aleks: por mi gravas la revuo. Mi aliĝis ĉefe pro tio. Ne aliĝis pro la idealo sed por la praktikaj avantaĝoj. Ŝatis plurajn rubrikojn en ĝi. Ŝatus klaran paĝon pri SAT.

Vinko: ĉiam pretas verki artikolon, sed kun precizaj indikoj pri amplekso kaj tempolimo.

GiMo: gravas konservi kvaliton de ĉi tiu revuo. La ritmo gravas pri la sendotarifo.

Ĵak: ĝis kvar eblas konservi ISSN.

GiMo: ŝatus dumonatan revuon kaj pli kompletan. Ankaŭ ĝeneralaj artikolo havus pli bonan lokon en Sulo. Mankas franclingvaj artikoloj por propagandi al neesperantistoj. Antaŭ kelkaj jaroj tion faris en "l'Age de faire".

Armela: El Popola Ĉinio estis tre bona revuo por varbadi kvankam nur esperanlingva.

Vinko: pretas kunordigi enpaĝigon por suplemento en la franca antaŭ la Homarfesto unu fojon en la jaro. Povus esti gazet-artikolo, Kondiĉe ke estu limdato.

Sir: pri la artikoloj pli Sennaciul-ecaj, Selle jam de longe ne plu sendis tekston. Ankaŭ Gohin ne plu aŭdas kaj vidas. Alia rimarko reage al Vinko, kiu diris ke li pretus verki ion je limdato, je specifa longeco kaj tempolimo. Por ni kiuj devas zorgi pri la enpaĝigo ktp, tio konsistigas plian aldonan taskon. Ĉasado de verkantoj estas io bezonata.

Robin': de kiam mi faris tiun unuan proponon, ĝi evoluis, kaj en la letero kiun mi skribis al PK de SAT, mi esprimis ke pri SAT kaj LEA-oj, ni devas konsideri la komunikan politikon en sia tuto. Ankaŭ estas reteja komunikado. Mi pensas ke oni iom desupre rigardas kio okazas tie, mi vidis ke estas diversaj mondetoj unu apud la alia, kiuj ne komunikas inter si. Temas pri retejoj, kiuj eĉ ne ligas unu al la alia. Mankas ligo al la blogo "neniammilitointerni", ekzemple. Centre estas SAT kaj ĉirkaŭe estas diversaj LEA-oj kaj neformalaj grupoj. Ĉu ni povas imagi speguli ĉi tion en nia komunikad-politiko? Pri interreto, proponas havi ĝeneralan portalon pri SAT-movado, kaj trovi iun sistemon por interrilatigi aferojn. Koherigu ni la aferon por ŝpari homfortojn.

Maurice Burtet: estas tro da limoj inter SAT-Amikaro kaj SAT. Mi estas internaciisto.

Serĝo: kiujn limojn vi vidas?

Maurice: limoj de Francio.

Serĝo: tio estas la problemo de la limoj de Francio.

Vito: celo de SAT-Amikaro estas varbi al Esperanto por esti en SAT.

Maurice Burtet: ne estas sufiĉe da interŝanĝoj inter ambaŭ. SAT-Am tro naciista.

GiMo: konstatas kiel komitatano ke ni ne sufiĉe laboras pri la dua celo de SAT-Amikaro, celante varbi al SAT. Nur kvarono de SAT-Amikaranoj estas SAT-anoj. Ni devus pli varbi al SAT. Propono al la PK de SAT krei ambaŭan kotizon pri LEA-anoj kaj SAT-anoj.

Rolando: pri LEA-oj kun SAT, se vi proponas komunan kotizon por tiu, kiuj aliĝis al ambaŭ asocioj, povas esti malpli alta sumo. Duono estu redonita al SAT-Amikaro, kaj la alia al SAT.

Serĝo: tamen deziras tri liniojn por prui ke SAT-Amikaro estas naciisma.

Ansofi: necesas ĉiam respondi al la neklaraj ideoj, kiuj donas la impreson ke estas limoj.

Robin': naciismema certe ne. Sed Eŭrop-franclingvie centrite nepre jes.

Vito: fakte tamen ofte artikoloj el kaj pri Afriko.

Serĝo: en 8 numeroj el dek estis artikoloj ĉu el ĉu pri Afriko.

Ĵak: pri la aperritmo, estas danĝere ŝanĝi ĝin. Povas aperi unu fojon okpaĝa gazeto.

Vinko: por Sulo paso de du al tri monatoj...

Serĝo: dum la tempo kiam mi laboris, mi sukcesis respektigi ĝin. Certas ke ni falos en la problemo de Sulo. Povas garantii, ke se oni decidus du monatojn la ritmo estos respektata. Ankaŭ havas alian solvon, ke povus esti du numeroj el tri monatoj. Ŝajnas ke pli gravas la reguleco ol la longeco. Problemo estas, ke oni ne scias kiam ni ricevos ion.

Aleks: jam nun la membraro falas, timas la sekvojn.

Vito: tute kredas ke multaj membroj restas ligitaj al SAT-Amikaro pro la revuo.

GiMo: ni perdas multajn membrojn nuntempe.

Aleks: Eo-France. Kalkulis de 2006 al 2012 la membraron kaj abonantaro. 37% por membraro, 47% por la abonantaro.

GiMo: aperritmo ne estas bona. De unu al tri numeroj jare.

Rolando: redukti la aperritmon ne tro endanĝerigos. Konstatas, ke la homfortoj estas multe malpli viglaj nun ol antaŭe.

Aleks: krizo de Esperanto-revuoj, abonantaro malkreskas. Kontakto signife pliboniĝis ĉar aktiva kaj motivita redaktoro.

Rolando: Meva abonas, kaj ne ricevas tiom regule.

Gimo: nur 20 abonantoj al la SAGO. 400 aliĝantoj al SAT-Amikaro.

GiKo; por reveni al la diroj de Robin', nun multaj ne plu paperaj gazetoj. Ĉu fideligeblaj per reto?

Serĝo: la debaton ni prezentos morgaŭ al la membraro. Pri la diversaj proponoj pri aperigo. Laŭ mi estas tri proponoj

- 1) sama ritmo sed maldikiĝo
- 2) duonigo de la ritmo sed konservo de la amplekso
- 3) konservo de la ritmo kaj amplekso koste de la kvalito

Vito: ankaŭ estas principa propono ke la SAGO estu suplemento al Sulo.

Robin': tio povus esti konsidero al la tuta komunik-politiko

Vito: propono pasintjare konsiderenda.

Serĝo: ĉiuj konsentas pri kopi-gluado plaĉas al neniuj. La revuo aspektu same kiel ĝi nun estas.

Vinko: pri plikoherigo, tio estas la rolo de la LEA-Komitato.

Serĝo: se oni duonigas la laboron, oni ŝparas monon ĉe la presisto. Ankaŭ ekzistas solvo pagigi profesiulon 10-horojn. Tio estas la komenco de malpli engaĝiĝo de la membroj. Oni alkiutimiĝas, ke dungito faru la laboron. Engaĝigo estas tre influa afero.

Aleks: interese havi la jaran buĝeton. Se oni taksus mian laboron, la sumo estus sufiĉe alta.

Solange: kion preferas la skipo?

Serĝo: mi daŭrigos je tiuj kondiĉoj. La kontribuo de Deĉjo ŝparis nenion pro la sistemo. Lia foriro ŝanĝas nenion pri la necesa laborkvanto.

GiKo: ĉu oni povus havi 8 numerojn jare, kaj 12 paĝoj. Kun strebo pri franclingva kromnumero ?

Serĝo: eble necesus aparta engaĝigo, eble de Deĉjo. Ankaŭ eblus retrovi normalan ritmon kun alia kunlaboranto.

### **Tria laborkunsido**

*Lundon la 1an de aprilo je la 9:00*

*Prezidas Franjo Lévêque*

Pri kandidatoj.

Guy C.: Filipino Stride ja konsentas kandidati. Anne-Marie Ferrier ne eniros en la komitato sed komencos jam labori por la komitato. Jam aliĝis al SAT-Amikaro. Reprezento de la kandidatolisto.

23 por, neniu kontraŭ, neniu sindeteno.

Franjo: dua punkto, kiu devis esti traktita hieraŭ. Raporto pri la libroservo.

Veroniko Girard: prezentas la vendoliston. Lasta aperinta eldono estas "Ĉe la lago". Planite reeldoni "Dictionnaire pratique".

Serĝo Sir: Andreo Andrio laboras pri la reaktualigo. Ĝi estas preskaŭ preta.

Gimo: estus bone reeldoni Plenan Vortaron.

Serĝo: afero de EFK, ne SAT-Am.

Vito: kio estas la restanta stoko de "Raciaj kursoj"?

Serĝo: vortaroj kaj kursolibroj plej vendiĝas.

Franjo: sed unue glumarkoj.

Vero: pri CR, 2600.

Guy C.: duono de la 5000 stoko.

Vero: junulkurso 250, DP 200, Dic. Poch 1500.

Ansofi: de kiam datumas la lasta eldono de Junulkurso ?

Vero: ne scias.

Ansofi: ni reeldonis CR antaŭ nelonge, sed ne Junulkurson.

Guy C.: CR reeldonita en 2006.

Vero: kaj DP en 2000. Pri GDEF restas 4000.

Franjo: pri la kontoj, donas la parolvicon al GiMo.

GiMo: projekciis bildon ĉe la frontpaĝo, kiu ne estis videbla interne. De 600 en 2004 al 420 en 2012. Pri kotizoj, oni kvazaŭ sekvas la verdan linion. Ĉi-jare proponas statistikon pri la meza aĝo de la membraro. Ni havas informojn por 83%. Meza aĝo estas 67. Ĉefe inter 60 kaj 80. Multaj pli junaj membroj inter la mankantoj. Elspezoj 2012. 36% da bonvolula laboro enkalkulita. SAT-Amikaro funkcias ĉefe danke al bonvolemuloj. Pretas respondi al pli precizaj demandoj. Enspezoj: 15% kotizoj, 24% libroservo, 40% bonvolemuloj. Rezultoj pri ekspluatado: sen amortizo kaj esceptaj spezoj. Ĉefaj aktivajoj estas la libroservoj. Administrado: ĉiuj spezoj pri la sidejo kaj repagoj pri vojaĝokostoj. Esceptaj elspezoj. Bilanco: foto de la bienoj de SAT-Amikaro. Iom pli ol 100 000 eŭroj da nemoveblaĵoj. Kelkaj malfruantaj fakturoj al libroservo. Stoko de la libroservo taksita je 100 000 eŭroj. Estas malfacile taksi la nombrojn, kaj la valorojn de antaŭ 20 jaroj. Kalkulita laŭ aĉetprezo, ofte forgesita. Disponebla mono ĉe la poŝta banko, kaj ankaŭ en la NEF. Pasiva parto: rimedoj, kiujn uzas la asocio. 400 000 eŭroj da asocia kapitalo. Kelkaj fondusoj, ĉefe pri novaj eldonoj kaj solidarkaso. Ŝuldo nur al EFK. Problemo ĉar ne estas kasisto, kaj ni ne scias ekzakte pri la ŝuldoj. Evoluo de la vendoj. De 2004, estis tri esceptaj jaroj por 2005-2007. Iom pli ol 20 000 eŭroj jare. Ŝvitis por prezenti la nombrojn antaŭ la kongreso.

Aleks: ŝokis min en via raporto la vorto "rezulto pri ekspluatado" en SAT-Amikaro. Ĉu dungo de Phil Guichet aŭ de bonvolemluloj.

GiMo: ŝokis min mem skribante tion, sed ne trovis alian vorton. Fakte tute kapitalista vorto, konsentite.

Guy C.: ligita kun kontado.

Ansofi: samstila demando. En la unua tabelo, estas ekstera ekspluatado. Pri kio temas? Tamen ne komprenas al kio korespondas pri tiu ekspluatado? Ĉu vi povas klarigi pri kio temas?

GiMo: temas pri ĉiuj aferoj venditaj aŭ aĉetitaj en la jaro. Amortizo kaj esceptaj spezoj estas ekster ekspluatado.

Ansofi: mi daŭre ne komprenas.

Gimo: libroj, kotizoj, abonoj kaj donacoj.

Vito: ĉu spezorezulto?

Gimo: kaj la rezulto estas - 4000.

Isabelle Lamy-Rested: estas nur unu sidejo en Parizo, ĉu?

Gimo: SAT-Amikaro aĉetis sidejon en Parizo, unue en Gambetta kaj nun ĉefe en Vincent-Auriol. La membroj uzas lokon aliloke. Sidejo uzita ĉefe de la parizanoj.

Isabelle: sed la aliaj lokaj grupoj ne havas sidejon, ĉu?

Gimo: ne.

Monique Dussenty: senpaga loko por ni.

Gilbert Darrieux: same urba loko.

Gimo: en Sud-Kivuo, kunvenas ekstere.

Aleks: demando pri la plivigligo de lokaj grupoj. Ĉu elspezo de mono celis vigligi la grupojn.

Gimo: ni ne sufiĉe agadis en tiu ĉi direkto. Laŭ la statuto, SAT-Amikaro redonas kvaronon de la kotizo al la lokaj grupoj. Eĉ elspezo de 1000 eŭroj signifus revigligon de la asocio.

Aleks: al kiu utilis la 370 eŭroj ?

Gimo: ĉefe utilis al la membroj surloke. Ankaŭ helpo en afrikaj landoj.

Ansofi: ŝatus pli bone kompreni la malaltiĝon de la membronombro. Pro la ĝenerala aĝo estas verŝajne multaj mortintoj, kaj ne nur realiĝantoj. Kiaj proporcioj?

GiMo: mortis 5 aŭ 6 en 2012, ne realiĝis pli ol 100 membroj, aŭ 99 fine. Bonŝance 46 novuloj aliĝis. La kialojn mi tute ne scias. Krom unu aŭ du kiuj grumblegis, ĉiuj aliaj ne esprimiĝis. En la

komitato mem, ni ne havas homfortojn por realvoki homojn. Preskaŭ 100 respondis al realvokoj.

Serĝo: mi tute nenormale ricevas petojn esti forstrekita de la membraro. Anstataŭ sendi al SAT-Amikaro, homoj sendas al la SAGO. Kiam mi transdonas, ne donas la kialojn. Plej ofte maljunuloj kiuj ne plu povas legi la gazeton.

GiMo: pro tio estas kelkaj membroj sen revuo.

Anne-Marie Ferrier: Kio estas NEF?

GiMo: kooperativo pri bankaj aferoj. Franclingve: Nouvelle Economie Fraternelle.

Anne-marie: kial en la buĝeto 2013 estas nulo?

Gimo: 2011 fakte, ĉar ni ne aliĝis.

Solange Van Landeghem: ĉu vi jam vidis, kiel geografie okazas la forfaloj ?

Gimo: nun ĉirkaŭ 12 perantoj en la tuta Francio kaj ekstere. Membroj dispartigitaj. En la pariza regiono kaj alia senperanta ne precize rigardis.

Aleks: ne komprenas la diferencon inter abonoj kaj aliĝoj.

Gimo: kiam oni kotizas al SAT-Am, parto por la abono kaj parto por aliĝoj. Lokaj grupoj kiel Bordoza aŭ Banjero subtenitaj je 200 eŭroj, je 90 eŭroj subtenis grupojn en afrikaj landoj.

Franjo: voĉdono pri la kontoj. 28 por.

Vinko: pri kongreso, aliĝilo ĉe Franjo. Duonhora prezento.

Terez' Pinet: entuziasme aliĝis, ĉar interesaj prelegoj, malmultekosta loĝado. Eble esto iomete varme, sed estas senpaga naĝejo. Esperas, ke ĝi estos malfermita sufiĉe frue matene.

Maksimiliano: pri du laborgrupoj. Pri la statuto, gvidita de Filipo Stride. La celo estas trovi la celojn de SAT-Amikaro, por decidi pri la laboro de SAT-Amikaro. Unua propono. Havi minimuman informon en la statuto kaj havi apude internan regularon, kiu estus pli facile modifebla. Sama regularo por modifi ĝin. Problemoj por kelkaj membroj estas ke kelkaj vortoj povas esti miskomprenitaj por kelkaj uloj: travailleurs, milieux d'avant-garde, propagande. Aliaj vortoj proponitaj povus esti problemaj: maldekstra kaj progresema. Precize pri la artikolo 1, pri la nomo de la asocio, estis unue proponite konservi la nunan. Dua ebleco elĵeti "des pays". Didier Janot proponis reklamocele "Esperanto-Solidarité".

Pri la medio, konservi "milieux d'avant-garde". Alia propono: les milieux définis par l'article 1 des statuts de SAT.

Pri la membroj, aperas la vorto "klasbatalo". Propono konservi aŭ forigi tiun parton. Anstataŭi "lutte de classes" per "luttés sociales".

Pri la komitato, artikolo 4. Ni devas havi inter 6 kaj 10 komitatanoj, kun listo de postenoj. Limigi la statutan priskribon al nombro kaj prezidanto pri kasisto.

Pri la vorto "propagande", anstataŭi per "communication". Propono krei grupon por daŭrigi tiun



debaton. Grupo gvidata de Filipino Stride. Vi povas jam doni vian retadreson se vi deziras debati. Nun estas ses membroj en la grupo.

Rolando: kio ne aperos en la statuto, aperos en la interna regularo.

Aleks: Maksimiliano bone resumis la diskuton.

*Gimo kaj Manon bonvolas partopreni.*

Guy C.: laŭleĝe estas nenio. Unu persono sufiĉas kun adreso por krei asocion.

Maksimiliano: pri la dua laborgrupo, varbado kaj diskonigo de SAT-Amikaro. Ne havas multe da novaĵoj pri tiu afero. Havas liston pri proponoj por diskonigi la movadon kaj agadon. Ĉirkaŭ dudeko da proponoj. Listigis en la retejo aŭ aliloke. Problemo estas multe da proponoj sed malmulte da uloj por fari ilin. Kelkaj aferoj estas forigitaj ĉar ne eblas kaj netaŭgas. Pri poŝtmarkoj kaj poŝtkartoj, Serĝo Sir' jam okupiĝis pri la afero.

Serĝo: en poŝtmarko ne eblas meti multajn informojn.

Maksimiliano: jam ekzistas dissendolisto de la asocio mem, kie nur membroj povas debati. Intenco krei duan liston pri informoj. Ekzemple ĉe Facebook, multaj homoj ligitaj al SAT-Amikaro volas esti informitaj pri la asocia agado. Dissendolisto dulingva por informi pri gravaj eventoj kaj agadoj. Propono de Aleks pri publikigo de listo de konkretaj kaj precizaj rimedoj, por ke uloj sciu konkrete kion fari.

GiMo: komento. Laŭ mi gravas aldoni kiu jam uzas la diversajn rimedojn.

Aleks: sugesto. Antaŭ iom da tempo rubriko pri "kiel fari?". Iom kiel la lerno-rondoj dumkongresaj. Plej interese estus ĉefe diskonigi la jam faritajn aferojn.

Guy C.: por Afriko, Mirejo organizis la laborgrupon. Unue SAT-Amikaro ne venos por kongresi kiel koloniistoj. Neceso estas, ke sufiĉe forta grupo invitu nin. Ankaŭ grupo, kiu povu inviti nin. Por kongresi en foraj landoj necesas havi monon. Se tio iĝus ebla, ni sciu tion minimume du jarojn antaŭe. Tiuj, kiuj havas la eblecon iri rilatu kun ni. Mirejo faras tion kaj Pierre Grollemund havas kontaktojn en Afriko.

Ueli: estis en Kamerunio antaŭ 20 jaroj.

Guy C.: rilatu kun ni, estas fonduso por tio. Jarfine estas kvina afrika kongreso en Kotonuo. Mirejo diris ke estas alia mondo. Ni ne havas saman motivojn por lerni.

Ueli: Mirejo petegis ke SAT-Amikaro sendu minimume du personojn al tiu ĉi kongreso.

GiMo: Robin' januare 2014 iros al Togolando.

Lucette: mi ne aŭdacis demandi al Mirejo kial UEA neniam kongresis en Afriko? Demandas sin kial Mirejo tiom deziras, ke SAT precize iru.

Ueli: UEA jam unufoje pere de ILEI kongresis grandskale.

Ansofi: pri anonco. Dum la SAT-amikara kongreso estis organizita ekzamen-sesio ke estis du kandidatoj. La direktorino de la ekzameno ankoraŭ ne havis la okazon konfirmi, sed verŝajne ambaŭ

sukcesis pri unua grado. Raphaële Pernot kaj Michael Bedu en Diĵono.

Serĝo: pri la SAGO, situacio sufiĉe grava. Ni decidis konservi la SAGO-n je la sama stato, do ne reduktos la kvaliton. Nediskuteble. Ĉar nun la teamo ne kapablas elteni la ritmon, ni nepre devas duonigi ion. Ĉu la ritmon, ĉu la paĝonombron. Petos opinisondon. Pri la kostoj, ŝajnas ke pli malpli estas la sama afero. Problemo ne mona, sed homforta. Vi povas levi la manon ambaŭfoje aŭ tute ne.

Thérèse Pinet: ĉu estos pli etaj artikoloj?

Rolando: la problemo estas manko de homfortoj. Nun estas sufiĉe da rubrikaj por daŭrigi pri la ritmo.

Serĝo: ni preskaŭ nenion forĵetis ĝis nun.

Gilbert Darrieux: kio pri reta sendo?

Serĝo: ne solvas la problemon.

Gilbert: povas helpi diskonigi la SAGO-n.

Vito: tamen pri tio ĝis fino de 2011 estis enretigitaj la numeroj entute post unu jaro. En 2012 ne plu okazis post ŝanĝo de enpaĝiganto. Plia laboro ne farita pro premo de troa laborkvanto. Projekto havi subretejon kie oni povus meti la artikolojn tekste.

GiMo: ankaŭ propono pri ok numeroj malpli peza.

Serĝo: ja meza solvo. Dum la nokto mi pensis pri tio, sed ne ŝatas tion ĉar temas pri kompromiso.

Isabelle Lamy-Rested: se ni duonigas la ritmon, utile havi la retpaĝon pri la novaĵoj de la kongreso.

Serĝo: tion vi rekte sendu en la listo.

Isabelle: ĉu ĉiuj en la listo?

Vito: retejo ankaŭ alirebla al ĉia publiko.

Ueli: ĉu vi havas scion kiom da SAGOj estas legataj?

Serĝo: nenia statistiko pri tio. Tre legata en la necesejo.

Franjo: ŝatus tujan voĉdonon.

Thérèse: vi ne klare diris, ĉu estas la sama laboro por ambaŭ.

Serĝo: se propono, tio signifas ke ĝi estas eltenebla.

Pri la ritmo: 16 por. Pri la paĝoj: 9. Do ni duonigos la ritmon. Post aprilo, estos tiel.

Franjo: antaŭlasta punkto: perspektivoj, venontaj kongresoj kaj demandoj.

Guy C.: invitas al Simone Cajelot rekte esprimiĝi pri tio.

Simone Cajelot: jam trovis tri aŭ kvar lokojn. Unu proponita sed ne taŭga. Unu ebleco en sama Azureva-entro en Bussan. Tiamaniere ni povus ekskursi en Germanio. Lasis al Veroniko kelkajn dokumentojn.

Gimo: pri Afriko, kondiĉo estas, ke iu grupo organizu. Ĉi-jare estis ĉefe Mirejo. En novembro 2012 estis peto al la komitato pri registrado ktp. Ni preskaŭ bedaŭris, ke ni akceptos tiun kongreson. Mi rifuzis esti kasisto de tiu ĉi kongreso. Grava problemo por organizi kongreson. Devas esti surloka skipo. Ĉi tie estas kelkaj surlokaj helpantoj, sed ni vere bezonas skipon de organizantoj. Estas pli facile eĉ por la portanto.

Simone Cajelot: eble povus turniĝi al la skipo en Strasburgo.

GiMo: ĉu nun jam konsentis?

Simone: ne jam kontaktis ilin.

Aleks: ĉu vi scias ke de kelkaj jaroj estas provoj organizi komunan renkontiĝon kiel en 2011. Ĉu estas konsiderebla io en 2014?

Gilbert Darrieux: nombro de aliĝantoj ktp malkreskas. Kial ne pli ofte kongresi kun aliaj asocioj? Kaj ankaŭ labori kun la regionaj federacioj? Ne estas bone por la asocio se ne estas sufiĉe da kunlaborado. Projekto ĉiudujare.

Franjo: ankaŭ proponita ĉiun kvinan jaron.

Vito: ja estis propono por 2014 en Heruvilo, iom diskutis pri tio, kaj fine la OKK mem rezignis pri la kongreso.

Lucette: mi insistis, ĉar jam mi grumblis, ke la prezo estu dolĉa. Z kreis la lingvon por ĉiuj.

Franjo: vi scias ke ni klopodas pri tio, en SAT kaj SAT-Amikaro.

Gimo: mi ne komprenas en eŭroj, kion signifas? Ĉu ĉi-tie estas dolĉa aŭ ne?

Franjo: ĉu 20 eŭroj tage, aŭ 50 eŭroj tage.

Lucette: en Ĉatoruso estis favoraj kondiĉoj.

Roland: estas ankaŭ diferenco inter luksa kaj komforta. La alia por mi ne estis realisma pro la etaĝaj litoj. Aspektas ĉi tie lukse, sed fakte estas komforte. Kosto ne estas la nura kriterio.

Franjo: eblas ricevi helpon de la komitato pere de la solidarkaso.

Roland: pri la demando. Pretas helpi por konstrui skipon.

Gimo: gravas havi unue skipojn, kaj poste lokon.

Franjo: ĉu jam estas propono por 2015?

Aleks: ne scias ĉu Eo-Fr havos kongreson en 2015, ĉar en 2015 estos UK en Lille.

Gimo: pri perspektivoj. Pri la SAGO iom trovis solvojn. Mi tamen substrekas, ke daŭre estas krizo.

En 2014 nur 5 kandidatoj restas por la referendumo. Mankas homfortoj en diversaj taskoj. Problemoj postrestas. Realvokas ĉiujn membrojn por partopreni en la taskoj. Ŝategas la laboron de Maksimiliano, ĉar eblas proponi diversajn taskojn.

Serĝo: aldoni pri la SAGO. Por la SAGo, petas pligrasigon de la skipo. Se ni ne estos dek post jaro, ni ĉesos.

Mirejo : prezentas venontan afrikan kongreson, kiu okazos fine de 2013 en Benino. Svisa fonduso « Scio sen barilo » estis kreita por monsubteni ĝin.

En 2015, ILEI verŝajne organizos renkontiĝon en Senegalio. Ŝi proponas tiam komunan aranĝon kune kun kongreso de SAT-Amikaro.

Pri kongreso en Afrika lando, nepre ke iu loka grupo funkcigu kaj petu SAT-Amikaron por ĝin organizi.

La membrokunveno estas fermata.